# La NASKa Fasko

*Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe UT-Dalaso*

**mardo, la 26-an de junio, 2012 • numero unu**

## Venontaj eventoj

### Mardo (hodiaŭ)

★ **7:30 atm: Promeno al la manĝejo**
Renkontiĝu en la vestiblo je la unua etaĝo. Ni piediros al la manĝejo kune.



★ **8:45 atm: Saluta kunsido**
en la granda klasĉambro je la unua etaĝo, n-ro **1.001**.

★ **11 – 12:15: instruado**

★ **12:30 – 1 ptm: tagmanĝo**

★ **posttagmezo: libera tempo**
ripozu, renkontu viajn samĉambranojn, ktp.

★ **5 – 6 ptm: vespermanĝo**

★ **7:30 – ??? ptm: Interkona vespero**
Renkontiĝu en la komuna spaco ekster niaj ĉambroj. Ni konversacios, ludos, kaj trinkos teon, se vi volas.

### Manĝejo-horoj

La manĝejo estas malfermita dum la jenaj horoj:

★ **7:30 – 8:30 atm: matenmanĝo**

★ **11:00 atm – 1:00 ptm: tagmanĝo**

★ **5:00 – 6:30: vespermanĝo**

Nepre kunportu vian nomŝildon kaj oranĝan karton; vi bezonos ilin por eniri senpage.

***La NASKa Fasko***
**Redaktejo:** Ĉambro 4.418
<nask.esperanto@gmail.com>


*La NASKa Fasko* estas ĉiutaga informbulteno de la kursaro. Trovu ĝin matene sub via pordo aŭ en la komuna spaco en la 4-a etaĝo.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 4.418, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al <nask.esperanto@gmail.com>.

## Via unua tago ĉe NASK: kio okazas hodiaŭ?

*Hoss Firooznia estas via helpinstruisto: li organizas la eksterkursajn eventojn, redaktas tiun ĉi ĵurnalon, kaj estas preta helpi vin diversmaniere.*

Bonvenon al NASK! Hodiaŭ matene ni havos bonvenigan kunvenon por enkonduki viajn instruistojn kaj sciigi al vi gravajn informojn pri la kursaro. **Je 9:00 atm, bonvolu kunveni en la granda klasĉambro en la unua etaĝo, numero 1.001**.



Espereble ni jam trafis vin persone por montri la vojon al la manĝejo; se ne, serĉu min (Hoss, la ulo kies muzelo aperas dekstre) **en la vestiblo ĉe la unua etaĝo je 7:30 atm** kaj mi gvidos vin al la manĝejo.

Se vi bezonas ajnan helpon dum NASK, bonvolu kontakti min; Vi trovos min en ĉambro 4.418 kaj mia retadreso estas <nask.esperanto@gmail.com>.

Welcome to NASK! This morning we'll have a welcome session to introduce your instructors and give you important information about NASK. **Please join us at 9 a.m. in the large classroom on the first floor, room 1.001.**

Hopefully we've already met you in person to show you the way to the dining center; if not, please find me (Hoss, the guy whose mug appears at left) **in the lobby at 7:30 am** and I'll show you the way.

If you need any help during NASK, please contact me; you'll find me in room 4.418, or you can reach me by email at <nask.esperanto@gmail.com>.

## Salutmesaĝo de Tim Westover

*Tim estas veterano de NASK kaj unu el la tri instruistoj ĉi-jare. Trovu lin en la sama ĉambraro kun Hoss (n-ro 4.418) aŭ kontaktu lin ĉe <timwestover@gmail.com>.*

Mi bonvenigas vin al NASK, kiu okazas la unuan fojon en Teksaso. Antaŭ dek du jaroj, en la jaro 2000, mi ĉeestis NASK-on en Sanfrancisko kiel novbakita komencanto. Mi tenis al la brusto *Gerda Malaperis*, kiun mi ankoraŭ ne finlegis, kaj ensaltis Esperantujon. Ekde tiam, mi spertis tre bonajn horojn kiel studanto, instruisto, verkanto, kaj kongresanto. Jen unu el la mirindaj trajtoj de Esperanto: oni povas, ene de mallonga tempo, fariĝi parto de riĉa internacia kulturo. Vi riĉigas nin per via ĉeesto ĉe NASK.



Mia ĉefa okupo en Esperantujo estas literaturo – legado kaj verkado. En la jaro 2009, mi aperigis novelaron, kiu nomiĝas *Marvirinstrato*. Ĝi estas senpage elŝutebla kiel bitlibro kaj ankaŭ paperforme havebla de diversaj Esperantaj kaj ne-Esperantaj libroservoj.

Se vi estas verkemulo, nepre diru al mi! Ĉe tiu unua NASK, mi verkis kelkajn poeziaĵojn. Ili estis tre malbonaj, sed oni ne forpelis min el Esperantujo. La instruistoj kaj aliaj ĉeestantoj multe kuraĝigis min per afablaj vortoj, gramatika kunlaboro, kaj lingvaj konsiloj. Ni ĉiuj povas helpi unu la alian.

Mia pordo restas ĉiam malferma al vi (nu, metafore malferma – se oni vere lasus la pordon malferma, laŭdire la seruro paneus). Venu iam ajn por babili, diskuti, verki, legi, aŭ distriĝi. Atendas vin teo – kafon vi devas mem kunporti.